

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La Jarkunveno 2025 okazigita

En la 2a de februaro, la 2025-a Jarkunveno de Neprofitcela Organizo Esperanto-Jokohama havis lokon en sia oficejo, nome la Esperanto-Muzeo Jokohama. El la 44 membroj, tie efektive venis 13 membroj, kaj kun 5 perleteraj voĉoj kaj 8 voĉoj komisiitoj, ĉiuj proponoj estis aprobitaj:

(1) la jarraporto por 2024 kaj la agadplano por 2025,

(2) la kasraporto por 2024 kaj buĝeto por 2025,

(3) renovigo de la estraranoj kaj revizoroj: Okazis proponoj ene de la kunveno, kaj fine jenaj personoj estis nomumitaj. Poste la estraranoj kunvenis kaj ili decidis inter si reprezentantoj. (Vidu sube)

(4) parta revizio de la Statuto: Nia jarkotizo por plenrajta membro estas 6 mil enoj jare, kaj jam rabato por

familiano loĝanta kune kun membro troviĝas, nome 3 mil enoj. Aldoniĝis samkotiza rabato por junuloj (ĝis 35a jaraĝo), handikapitoj, kaj aliĝinto post julio.



fotis Doi Hirokaz

Novaj estraranoj por la periodo 2025-2026

(marko *: nova nomumo. Aliaj estas de la antaŭaj jaroj)

Reprezenta estrarano: Sibayama Zyun'iti

Vic-reprezenta estrarano: Namba Fumiharu

Aliaj estraranoj: Arai Kazuhiro, Doi Hirokaz, Miyazaki Hideko, Sugita Naoya*

Revizoroj: Suzuki Keiichiro, Krobara Aliza*

Okazos

Sakuraj floroj prezentaj kun pendlanternoj

Borde de la Rivero Oooka, ankaŭ ĉi-jare estos prezento de sakuraj floroj, kun pendlanternoj lumigataj vespere. Nia rondo ofertas 7 lanternojn kun nia nomo.

La Jar-kajero 2024-a, de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en 2024, kun peto pardoni nin pro malfruiĝo de la raporto ĝis februaro 2025. noto: [MZ] estas por Esperanto-Muzeo Jokohama. [IR] por interreto. < > por la n-ro de tiu ĉi gazeto, enhavanta artikolon pri tiu afero.

*feb. 18 [MZ] La Jarkunveno de nia rondo, kun aprobo de la antaŭjara raporto kaj kaso, de ĉi-jara plano kaj buĝeto, kaj aldono de s-ro Doi Hirokaz al la estraranoj. Ĉio aprobita.

*mar. 8 : Ni testamente ricevis parton de heredaĵo de s-ro Aida Kiyoshi, forpasinta en 2023. La testamento indikas, ke la heredado inkluzivas la volon de lia edzino Aida Yayoi, forpasinta en 2021.

*mar. 20 (parte [MZ]) Vizitis nin s-ro Andre Christian Weber el Germanio. Ni gvidis lin tra la urbo. <n-roj 395, 396>

*mar. 22 - apr. 7 [Riverbordo de Rivero Oooka] Estis Festenado pro apreci sakur-florojn laŭborde de Rivero Oooka, kun pendlanternoj por prilumi sakurojn vespere. Al tio ni oferdonis 6 lanternojn kun nia nomo.

*mar. 31 [MZ] Hama-Ronda Tago, kun 7 partoprenantoj. Temas pri “Serio Oriento-Okcidento”, libraro de la mondaj literaturaĵoj. Nia Muzeo posedis siatempe plej multo en la libroserio, krom 4 pecoj. Kelkaj vizitis la supre nomitan aprecadon de sakur-floroj <n-ro 395>.

*apr. [MZ] Eks-banejo al librobretaro: Nia Muzeo estis loĝdomo por familio antaŭ ol nia aĉeto, kaj havis banejon kun bankuvo. Ni forigis la bankuvon kaj akvokranon, kaj faris ĝin ĉambro kun aldona librobretaro.

*apr. [MZ] Ni sendis 3 pakaĵojn da libraj duoblaĵoj al Internacia Esperanto-Arkivo en Belgio.

*jun. 7 [IR] la 131a legokunsido, pri la libroj elektitaj mem, kun 5 personoj. <n-ro 398>

*aŭg. : La 109-an UK-on en Tanzanio vizitis 2 el niaj membroj; Suzuki Keiichiro kaj Namba Fumiharu.

*sept. 6 [IR] la 132a legokunsido, pri “La senco de musa vivo” de Aleksandra Watanuki, kun 5 personoj. <n-roj 401, 402>

*sept. : Tiu ĉi gazeto « Novaĵoj Tamtamas » atingis la 400-an n-ron. <n-ro 400>

*sept. 16 [MZ] Prezento de spertoj de niaj membroj. Estis 10 prezentoj, kaj venis 19. <n-ro 401>

*sept. 27 – nov. 25 [Kultura Ekspoziciejo de Urbeto Hasami, Gubernio Nagasaki] Okazis tie ekspozicio i.a. pri la vivo de Kuroita Kacumi (1837-1946), kiu estas pioniro en la japana Esperanto-Movado. Nia Muzeo pruntedonis Esperanto-Japanan Vortaron kompilitan de li.

*okt. : La 3-an Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio vizitis 7 el niaj membroj ; Suzuki Keiichiro, Namba Fumiharu, Inumaru Fumio, ges-roj Doi kaj ges-roj Sibayama. <n-ro 401>

*dec. 1 [Earth Plaza, en Jokohamo] Partopreno en evento « Earth Festa Kanagawa », kun Esperanto-Societo de Kawasaki. Temas pri evento celanta internacian interkomunikiĝon en Gubernio Kanagawa.

*dec. 6 [IR] la 133a legokunsido, pri “Krokodilo” de la grupo ‘Esperanta Ponto’, kun 5 personoj. <n-ro 403>

*dec. 15 [Forum Minami-Oota, en Jokohamo] la 54a Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagawa, kun ĉeesto de 24 personoj. <n-ro 403>

Niaj klasoj

***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo, 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon “Homoj manĝantaj” de Hemmi Yo.

***Homoj** (eksa nomo de la klaso: **Eseoj**): gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabato, 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon “Homoj manĝantaj”.

***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per reto-programo Jitsi, en sabato, 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton oni legas “Sub Cirkotendo” de Stan Bubeniĉ, de sept. 2024. La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo

libere elektita.

***Teksanto**: gvidas Doi Ĉieko, per reto, en lundo. Oni nun legas “Kredu min, Sinjorino!” de Cezaro Rossetti.

***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo. Legata estas “Viktimoj” de Julio Baghy, sed baldaŭ oni finos. Alia libro serĉata.

***Elementa kurso**: gvidis Doi Ĉieko unu kursanon per “Hanako lernas Esperanton” kaj finis en la jarfino de 2024. En tiu ĉi jaro, oni elektos iun libron por daŭriga klaso.

eseoj

Vintraj Steloj

Mizro Iwaya

La fenestro de mia ĉambro frontas al la sudokcidento. Lastatempe el ĝi videblas klara stelo nomata Venuso eble ekde antaŭ unu monato. Kiam la suno apenaŭ subiras en vespero, ĝi jam aperas alte en la ĉielo. La ĉielo ankoraŭ ne estas sufiĉe malluma, sed la lumo de Venuso estas pli forta ol cirkonstanca diafana lumo.

Antaŭ unu monato mi vidis tuj super ĝi malfortan lumon. Ĝi estis Saturno. Tagon post tago ĝi proksimiĝis al Venuso kaj baldaŭ malaperis ien. Nun mi ne povas trovi ĝin, ĉar ĝi iris tro suben ekster mia vidkampo. Venuso sola brilas forte en vespera ĉielo.

La ŝtuparo de nia apartamentaro frontas al la nordoriento. Kiam mi iras la ŝtuparon suben-supren, mi povas vidi Jupiteron jam de antaŭ unu monato. Lastatempe ĝi iris tro supren kaj aperis Marso anstataŭ ĝi. Ili ambaŭ estas sufiĉe lumaj en malhela vintra ĉielo.

Baldaŭ mi povos vidi Vintran Trilateron, nome Siriuso, Prociono kaj Betelĝuzo. Fakte mi povas vidi ilin meznokte super mia kapo, sed tio estas praktike nebla. Baldaŭ ili aperos en sudokcidenta ĉielo. Tiam mi povos vidi ilin el mia fenestro.

La aero estas tro malvarma nokte en Jokohamo. Tial mi ne volas iri eksteren por vidi stelojn. Nur en la ĉambro kaj el la fenestro. Sed en Okinavo la aero estas agrable malvarmeta en nokto. Tial mi povas vidi meznoktajn stelojn tie. Kiam mi kuŝis sur la ĝardeno kaj rigardis supren ĉ. je la deka, mi trovis ke la konstelacio de Oriono ŝvebis ĝuste super mia kapo, tute klare. Kiam mi vidas ĝin en Jokohamo, du unuaklasaj steloj, t.e. Betelĝuzo kaj Riĝelo,

videblas klare sed aliaj mallumaj steloj ne estas facile videblaj. Sed en Okinavo ĉiu el la kvar pintoj kaj tri mezoj estas klare videblaj. Certe la ĉielo estas sufiĉe malluma.

Mi povas vidi Saturnon sed ne la Ringojn. Mi memoras ke mi vidis ĝin antaŭ dekoj da jaroj kiam mia amiko portis grandan teleskopon al iu domo. Ili estis sufiĉe klaraj kaj misteraj. Se nova ŝanco favoros al mi, mi povos vidi ilin refoje. Ĉu tio eblos, aŭ ne?



Ĉu fraŭdo aŭ ...


SIBAYAMA Noriko

En la 11a de decembro, mi kaj mia edzo iris por aĉetado. Survoje ni trovis antaŭ Stacidomo Oohuna tri lernejaninojn en uniformoj ŝajne de supera mezlernejo. Ili laŭte unuvoĉe kriis, “Mondonacon ni petas.” Komence mi ne bone aŭdis la voĉon, ĉar mi estis iom malproksime de ili. Ni alproksimiĝis al ili, kaj mi vidis portafiŝon portatan de unu el ili. Mi apenaŭ legis la frazon “Por savi bestojn” sur bruna kartono ne tre bela. Ankaŭ la literoj estis mizeraj.

Dum du tri minutoj kiam ni rigardis la scenon, almenaŭ du viroj mon-ofervis. Tiam ni iom hastis por aĉetado, ni preterpasis ilin. Mi pensis, ke revenvoje mi mon-oferu. Post iom da tempo ni finis la aĉetadon kaj denove venis al la tri knabinoj, sed ili jam ne estis. Ĉu ili tiom rapide

finis la agadon? Mia edzo diris, “Povas esti ke ili komencis matene kaj ĵus finis la agadon.”

Tamen mi, suspektema aĝulino, pensis, “Povas esti ke ili faris fraŭdon: nome ili celis



gajni poŝmonon por si mem.” Kial? Unue ĉarmaj knabinoj en kostumo de lernejo altiras atenton de galantaj viroj. Due la portafiŝo estis ege mizera. La papero ne estis ortangula kartonpeco, sur kio ili skribis ne tre belajn literojn.

Se ili ankoraŭ starus ĉe la stacidomo, antaŭ mon-ofero mi volus demandi de ili, “Al kiu organizo vi donacos la monon?”

De kiam mi fariĝis tiel suspektema? Antaŭ jaroj iu bredisto tenanta multegajn hundojn bankrotis lasante mizerajn hundojn. Tiam iu societo por protekti bestojn alkuris al la aktuala loko. Televido elsendis tion, kaj la societo petis ofermonon per socia retservo. Multaj bestamantoj, ankaŭ mi, sendis monon al la konto. Sed tiam mi iom sentis suspektemon, ĉar la nomo de la konto estis individua nomo sed ne la nomo de societo. Poste la societo malkovriĝis kiel falsa societo. Sed finfine forlasitaj hundoj ĉiuj havis novan familion. Tiam en socia retservo aperis jena opinio: post ĉio ĉiu hundo trovis bonan tenanton, do fino bona – ĉio bona, ĉu ne?

De nun ĉu mi fariĝos pli kaj pli suspektema, kaj mia edzo tenas naivecon?

sezonvorto februara

Glaciflosoj 流水

Okita Kazumi

Ĉe la marbordo de Hokkajdo laŭ la maro de Oĥotsko, glaciflosoj ĉiujare atingas la marbordon inter la fino de januaro kaj februaro.

Tiuj glaciflosoj blankigas la maron kaj eligas sonon similan al bestokrio, “kju.”

Oni diras, ke homoj loĝantaj ĉe la marbordo foje rimarkas la alvenon de la glaciflosoj per ĉi tiu sono.

